

Citaĵoj el la verko *Kun siaspeca spico* de Raymond Schwartz, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 515, 1973.08.22 & 25

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni komencis prezenti al vi la ĵus aperintan verkon ...*kun siaspeca spico!* de Raymond Schwartz, kiun eldonis Stafeto, leginte al vi erojn el poemoj kaj prozaĵoj de tiu libro, kie abundas sprito kaj vortludoj. Konklude al tiu atentigo al ĉefverko de nia literaturo, ni legas al vieron el *Laŭ mia ridpunkto*. Temas pri pli aŭ malpli fantaziaj historiaj raportoj, kiuj siatempe aperis en la SAT-organo *Sennacieca Revuo*. Ili estas unikaĵo en sia speco.

A.- Ni estas en 1952.

Cl.- *Frumatene aperis du policistoj ĉe kamarado, jam de kelka tempo zigzaganta preter la rekta vojo. Vestitaj kiel flegistoj ili invitis :*

A.- «Kara kamarado, vi ja estas malsana. Ni portos vin en hospitalon. Kuŝiĝu sur la portilon». - Survoje ili konversaciis jenmaniere: « Vidu, ni portas vin. Sekve ni estas **portantoj**. Do, kio estas vi ? »

Cl.- « Nu, respondis la alia, mi estas **portato**. »

A.- *Alveninte antaŭ la hospitalo, kiu hazarde deĵoris ankaŭ kiel distrikta tribunalo, la policistoj-flegistoj demetis la blankardon kaj diris : « Nun, kamarado, ni estas **portintoj**. Do, kio estas vi ? »*

Cl.- *Sensuspekte la alia konstatis : « Mi estas **portito**. »*

A.- « Ha, li konfesis ! » *Kaj oni tuj ekzekutis lin, ĉar tio okazis en lando, kie oni rajtas esti kontraŭ Tito, sed neniam... por Tito !*

Cl.- *Kelkan tempon poste, nur por pruvi al la mondo, kiel ĝisfunde funkcias la justeco, oni venigis la saman kamaradon antaŭ la saman tribunalon. Kaj gravmaniere juĝisto enketis : «Diru, kamarado, kiom da plej grandaj geniaj viroj estas nuntempe en Rusujo ?»*

A.- *Evidente, estas klare, ke la kamarado tuj flaris la kaptilon kaj tre singarde li lakonis :*

Cl.- « **Nur unu !** »

A.- *La juĝisto triumfis: « **Nur unu !** Ĉu vi aŭdis ? Li diris NUR UNU! Ĉu tio ne estas respondo **tutpure-nurnure** kaj tipe U-sona ? »*

Cl.- *Kaj pro tio, nun jam la duan fojon, oni ekzekutis la malsaĝulon.*

A.- Stulte ? Eble ne tiom, kiom neavertito povas unuavide supozi.

Cl.- Ni estas en 1956. La usona film-aktorino **Grace Kelly** edziniĝis al **Princo Rainier III de Monako**, alprenante la nomon **Gracia Patricia**. Jen kio tio fariĝas sub la plumo de Raymond Schwartz:

A.- *Almenaŭ pri tio ĉiuj facile akordiĝos, ke 1956 estis la jaro de l'graco. De l'Graco.. Kelli, kompreneble.*

Cl.- *Ĉu vi rememoras ? Ĉio malvolviĝis glate kaj senfalde kiel fabelteksaĵo. De l'komenco ĝis... la feino! Sed la feino estis jam ĉe l'komenco, ĉar ĉi tie neniel temis pri malriĉa paŝtistino. Male. Ŝi estis fama filmaktorino, al kiu enamiĝis... rano ! Kiel en fabeloj. Rano kun sceptro kaj krono. Rano kun numero. Kiel hotelĉambro. Nome, Rano III-a, princo de Monsako, aŭ proksimume.*

A.- *Li vidis ŝin unuafoje en kinejo, sur la ekrano. Por eviti ĉian konfuzon, ni nomu ĝin Ekrano IV-a. Do, Rano III-a senprokraste aĉetis la filmobendon kaj enfermiĝis en nigra kamero de sia privata kelo por rigardi la filmon neĝenate. Kaj li admiris : « Kia pozitivo en ŝia negativo !... Filmotondro !»*

Cl.- *Li estis trafita, kaj tial saĝe restis en la kel' li ! Sed tuj li komprenis, ke tio povas esti nur la fina etapo. Antaŭe ili devos geedziĝi. Kaj leĝe, kaj preĝe. Kun ĉio kaj ĉio kaj la granda orkestro. Sekve de kio ili unuiĝis. Komplete. Kise kaj kase. Kaj estis bela spektaklo, kiam ili staris mon-en-mone sur teraso de la princa kastelo, admirante dum mielluna nokto la unikan pejzaĝon de Mediteranea feaĵo.*

A.- *« Raneto, » flustris la princino kun senfina ĉarmo kaj subita inspiro, « kia panoramo ! Ĉu vi perceptas ? Pan '...Or '...Amo ! Tuta programo ! Ĝi estu nia devizo ! »*

Cl.- *Ĝi estu ! » Raneto akceptis, sed aldonis korektige : « Ĝi estu... unu el niaj devizoj, ĉar ni havas ankaŭ multajn aliajn. En la banko »*

A.- *Ĝis hodiaŭ ili vivas feliĉaj kaj havos multajn infanojn, ĉar ili scias, ke perfekta harmonio inter geedzoj dependas de perfekta ... hormonio kaj ke la komuna faktoro en tiuj du terminoj estas nek la haroj, nek la horoj, sed la mono. Ĝi ne mankas en Monsako.*

Cl.- *Tiu fantazia historio verkita laŭ la ridpunkto de Schwartz estas vere agrabla legaĵo. Beaŭrinde mankas al ni la tempo legi al vi trian citaĵon. Al vi mem malkovri ĝin.*

A.- **Eksterkadre**, jen poemeto titolita **Vortokresko** :

Cl.- *Por oportuna kuŝo - unu lito.
De kuŝo ĝis akuŝo - unu litero.
Akuŝo: ofta konsekvenco de - unu literaro.*

A.- *Kaj por konkludo, jen du semaforismoj. Kaj se vi deziras scii, kial Raymond Schwartz nomas ilin semaforismoj, vi legu lian libron ...kun siaspeca spico!*

Cl.- *Trinki brandon el respektinda kafotaso povas trompi viajn najbarojn, ne vian hepaton.*

A.- *Ĉiuj lingvoj estus multe pli facilaj, se ne ekzistus poetoj.*

Cl.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andree Gacond. Ĝis reaŭdo!*